

sub la suda kruco ★

ESPERANTO

Nova Multkolora ESK!

**Ni longe penis
en Tasmanio!**

Somerkursaro 2009



oficiala organo de la aŭstralia kaj nov-zelanda esperanto-asodoj
volumo 16[3] • numero 93 • majo-junio 2008

ESPERANTO SUB LA SUDA KRUCO

OFICIALA ORGANO DE LA AŬSTRALIA KAJ NOV-ZELANDA ESPERANTO ASOCIOJ

volumo 16 [3] • numero 93 • majo–junio 2008

Presita de CMYK Colour Online en Melburno, Aŭstralio

Redaktoroj | Chris Krägeloh & Ĝandor Monostori

Kontaktadreso | esk@esperanto.org.au

Abonoj & Pasintaj Numeroj

Esperanto Sub La Suda Kruco estas sendata al membroj de la Aŭstralia Esperanto-Asocio (AEA) kaj Nov-Zelanda Esperanto-Asocio (NZEa).

Por informoj pri abonoj, pasintaj numeroj, kaj pri membriĝo al la asocioj:

AEA | www.esperanto.org.au — info@esperanto.org.au

NZEa | www.esperanto.org.nz — nzea@esperanto.org.nz

Kontribuu al ESK

Sendu eseojn, ideojn, rakontojn, esprimojn de vidpunktoj, leterojn, desegnaĵojn, fotojn, kaj iun ajn alian originalan kontribuon al nia oficiala kontaktadreso, "esk@esperanto.org.au".

Limdato por kontribuoj por la sekva numero:

15 de julio 2008

La redaktoroj rajtas redakti, korekti, mallongigi kaj konformigi al la stilo kaj kutimo de ĉi tiu gazeto ĉiujn tekstojn antaŭ aperigo.

**Por la opinioj aperantaj
en ĉi tiu eldonaĵo respondecas la aŭtoroj.
Ili ne necese spegulas la opiniojn
aŭ de AEA, aŭ de NZEA.**

Copyright © 2008, AEA & NZEA — ĉiuj rajtoj rezervitaj.

Sur la kovrilo: Per Esperanto vi povas teni la mondon en viaj manoj.



4

Omaĝeto al Don



6

Novaj redaktoroj



8

Novaĵoj el Tasmanio



10

Mila elsendo de Esperanto-programo



11

La Dua Vivo



14

Malfermata vojo




16

Esperanto dreaming



18

Adiaŭ al Jean Lehane



20

Historio nekompleta

maio-iunio du mil ok

Omaĝeto al Don

Pli bone unu rozo kaj afabla vorto
dum mi restas inter vi
Ol tutplena kamiono da,
kiam ne plu estas mi.

de Vera Payne

Kun plezuro mi aldonu kelkajn vortojn al la bukedo de laŭdoj por nia estimata eks-redaktoro. Mia omaĝeto estas nur "poleksnajlskizo" kaj ne historia traktaĵo; tiu lasta esperable pli kapabla persono verkos.

Mi unuafoje renkontis Donald Broadribb kiam li estis lekciisto pri psikologio en la Universitato de Okcidenta Aŭstralio. Mi intervjuis lin por La Nigra Cigno.

Sandor, Liz kaj Don en York, Okcidenta Aŭstralio



Imagu, venis al nia eta ELWA grupo en Perto, Esperantisto el Usono. Kaj, ĉu jam tiam, ĉu en postaj jaroj, tiu eminentulo fariĝis Akademiano de UEA.

Tra la jaroj mi elkovris, ke kvankam eksterordinare brila ne nur en la Esperanto-kampo, Don ne timis eksperimenti kun modernaĵoj kiaj brilkoloraj vestoj – kaj ankaŭ hararo! Do, ne konservativa seka pruno.

Kompreneble li tuj partoprenis en Esperanto aferoj, kaj probable nur la tre novaj AEA anoj inter vi neniam renkontis lin, precipe kiel instruisto en la Somerkursaroj en Adelajdo kaj aliloke.

Mi scias, ke Don redaktis la oficialan organon de la (pri psikologio kaj psikoanalizo) Societo Jung, en Perto.

Sed multe pli grave por ni, li fariĝis la redaktoro de la oficiala organo de la Aŭstralia kaj Nov-Zelanda Esperanto-Asocioj. Dum pluraj jaroj mi pruvlegis Esperanto sub la Suda Kruco por li, do gustumis ĉiun vorton. Estis plezuro kaj honoro por mi pridiskuti la enhavon kaj la strukturon de, kaj la nuancojn en, la artikoloj en tiuj eldonoj. (Dank' al Dio pro la elektronika medio.) Estis ŝoko por mi informiĝi, ke li sin eksigis de la redaktora posteno, ĉar kiu el ni povus nei, ke la laboron li plenumis elstare?

Sed, fermiĝas unu pordo, malfermiĝas alia. Naskiĝis Mirmekobo, kaj jam du eldonoj disponeblas al mondvasta legantaro. Kompreneble, la kvalito brilas.

Antaŭ kelkaj jaroj mi ĉeestis la geedziĝceremonion de Don kun Liz Christmas. Ho, kiel bela paro en orkoloraj vestoj! Ili loĝas nun en York, kie antaŭnelonge ili vere verdigis sian vivostilon – vi povas legi pri la sunergi-paneloj kiuj gracias ilian tegmenton, en la bela Mirmekobo de Aprilo 2008.

Estas beno, ke li havas Liz kun si, ĉar Don trapasis en sia vivo plurajn gravajn batojn, inter ili la morto de sia kara filo. Li ankaŭ ne ĝuas tre bonan sanstaton. Sed neniam li plendas. Li nur ĉiam trovas ion per kio sin okupi kaj distri. Sur miaj bretoj kuŝas almenaŭ du libroj liaj. Mi kuraĝigis lin verki membiografion; verŝajne li estas tro modesta, sed mi vivas esperante.....

Dankon pro via senlaca laboro, kara kaj elstara eks-reaktoro (ho jen, Odlo!); valoris la peno. ★.

Novaj redaktoroj

Memprezento de Ŝandor Monostori, aŭstralia redaktoro

Mi naskiĝis en Hungario kaj eklernis Esperanton en 1982 kiam mi estis medicina studento. Bonŝance IJK okazis en Hungario en Debrecen en 1983 kaj mi partoprenis ĝin. Tie mi amikiĝis kun kelkaj esperantistoj kun kiuj mi daŭre tenas kontakton, plejparte retroŝte. Mi uzis Esperanton multe precipe vojaĝante dum la jaroj, kiam mi ankoraŭ loĝis en Hungario.

Mi ankaŭ ofte havis esperantistajn vizitantojn. Mi iĝis kuracisto en 1985. Mi partoprenis la UK-on en Varsovio en 1987. Mi enmigris Aŭstralion en 1988 kaj komence vizitadis la Melburnan Esperanto Klubon.


Mi devis fari ekzamenojn por registrebligi kiel kuracisto, do mi devis sufiĉe multe studi kaj ankaŭ iom labori. Pro tio mi ne havis sufiĉan tempon por esperantumi. Tamen mi estis listigita en la Pasporta Servo dum 2 aŭ 3 jaroj, kaj havis kelkajn gastojn. Post miaj sukcesaj ekzamenoj mi registriĝis kiel kuracisto en Viktorio kaj laboris en hospitaloj kaj mallonge ankaŭ en ĝenerala praktiko. Mi decidis specialiĝi pri patologio. Malfacilajn ekzamenojn mi devis fari por la specialiĝo

kaj mi bezonis intensivan studadon kaj multan laboron dum 6 jaroj. Dum tiuj jaroj mi apenaŭ havis tempon por Esperanto.

Bonŝance mi povis partopreni la UK-on en Adelajdo en 1997. Post mia patologio en 1999 mi laboris en privata laboratorio en Melburno kaj instruadis medicinajn studentojn en la Monash Universitato. En 2002 mi eklaboris en Wangaratta

kaj en 2003 mi translokiĝis al Bendigo, kie mi daŭre laboras kiel patologo. Antaŭ kelkaj monatoj Igor Couto, nia afabla tiama prezidanto, petis min iĝi kunredaktoro de ESK. Mi decidis preni tiun taskon, ĉar espereble tiu donas al mi la oportunojn iel

helpi la progreson de Esperanto-movado. Kiel evidentas mi estas tute sensperta en redaktado. Mi scias, ke la redaktado de ESK ne estos facila tasko kaj mi devos lerni multe. Mi petas vian helpon kaj komprenemon. Mi ŝatus iĝi ESK interesa, amuza, eduka legaĵo por ni. Bonvolu helpi nin, la novajn redaktorojn per viaj kontribuajtoj. ★



Novaj redaktoroj


Memprezento de Chris Krägeloh, nov-Zelanda redaktoro

Mia nomo estas Christian Krägeloh, aŭ, pli mallonge, nur Chris [Kris]. Kiel mia familia nomo indikas, miaj gepatroj estas germanoj, kaj mi ankaŭ naskiĝis en Germanio. Post kelkaj jaroj en Japanio kaj reveno al Germanio, mia familio decidis translokiĝi al Nov-Zelando, kiu fine okazis en 1996.

Post pli ol dek jaroj en Nov-Zelando, mi nun estas firme ankrita en tiu lando. Dum mi studis en universitato ĉi tie, mi renkontis tajlandan amik(in)on. Antaŭ du jaroj ni geedziĝis, kaj nun antaŭĝuos la naskiĝon de nia unua bebo en julio ĉi-jare. Estas ankaŭ dum mia tempo kiel studento kiam mi esperantistiĝis. Estis

je la fino de 1999 kiam Bradley McDonald kaj Dennis Pease starigis budon ĉe iu aranĝo festinta la internacian tagon de la homaj rajtoj. Mi tuj ekŝatis la ideon de Esperanto, parte ĉar ŝajnis al mi ke, tiu lingvo kaj ties internacia kaj interkultura komunumo, povas oferti multe al eternaj eksterlandanoj kiel mi. Ŝajnis ke tiu Esperantio povas esti la longe sopirita hejmo por homo kiu klopodas defini sian identecon trans- aŭ sen-nacie.

Do, kiel Ŝandor, mi travivis jarojn dum kiuj mi ne havis multajn okazojn okupi min pri Esperanto. Mi finis mian doktoran studadon en psikologio en 2005 kaj laboris kiel post-doktora sciencisto dum du jaroj. Finfine, mi trovis laboron kiel docento ĉe AUT Universitato en Aŭklando. Tiu laboro ege plaĉas al mi, ĉar ekzistas bona divido inter instruado kaj esplorado.



Mi antaŭĝuas la kunredaktadon de ESK kun Ŝandor kaj rigardas la transiĝon al nova kaj buntprezita formato kiel logan defion. La ĝenerala

espero ankaŭ estas ke tiu transtasmanmara kunlaborado en la redaktado ankaŭ signalas periodon de pli multaj kaj oftaj kontribuoj de la nov-zelanda esperantistaro. Dum la lastaj jaroj, kontribuoj de nov-zelandanoj al ESK malplioftiĝis, kaj mi certe esperas ke tiu tendenco inverŝigos! ★

Novajoj el Tasmanio

Mi Longe Penis - Esperanto, it's not what you think

de Robert Budzul

La 27an de Februaro okazis la tiel nomata tago de la societoj ĉe ka Universitato de Tasmanio. Ĉi tiu jaro estis la tria fojo, ke la universitata Esperanta societo partoprenis je tiu tago. Ĉi tiun jaron kelkaj el la novaj Esperantistoj helpis, do estis ege ĝuinda tago.

La bierfabrikejo Moorilla, kiu fabrikas Moo Brew-on, donacis al ni barelon da Moo Brew. (<http://moorilla.com.au/moobrew/>) sed ni bezonis iun, kiu havis la atestilon por response servi alkoholon. Feliĉe inter niaj novaj anoj estis Ĝinita, lernantino de medicino, kiu jam havis la testilon.

Ni ankaŭ havis novajn t-ĉemizojn kun la slogano - 'Mi Longe Penis - Esperanto, it's not what you think.'

Niaj novaj Esperantistaj helpantoj, ĉiuj portis la ĉemizojn, kiuj eĉ inter ne-Esperantistoj kaŭzis multe da intereso. Fakte ni vendis ankaŭ al ne-Esperantistoj kelkajn ĉemizojn.

La tago pasis ege, ege rapide, kaj mi, kiel helpanto, sentis, ke la kvar horoj pasis kiel kelkaj minutoj. La vetero estis bona, ni babilis kun multaj homoj pri Esperanto...

kaj pri aliaj lingvoj. Ni disvendis bieron, ni vendis t-ĉemizojn kaj ni tre ĝuis la tempon.

Ne estis nur kelkaj homoj, kiuj preterpasis nian budon - estis amaso da (scivolemaj) junaj homoj. Pli ol 20 homoj, kiuj antaŭe sciis aŭ nenion, aŭ nur iomete pri Esperanto pagis por aniĝi al nia klubo.

Jen kelkaj fotoj, kiuj montras kiel ni ĝuis la tempon.

Unu el niaj anoj ĵus revenis el Brazilo je tiu tago kaj li tuj venis al la tago de la societoj rekte el la flughaveno!

(Se iu interesiĝas pri la t-ĉemizoj rigardu www.tas.esperanto.org.au - kaj kontaktu nin per la retroŝtadreso tie. Ni ankoraŭ havas kelkajn por vendi. ★





Mila elsendo de Esperanto-programo

de Carol Lutz

Membroj de la Melbourne Esperanto-Kafo-Klubo gratulis al Alan kaj Jenny Bishop pro la 1000a elsendo de la Esperantoprogramo de radiostacio 3zzz, kiu okazis lundon la 21an de aprilo. La tre interesa programo enhavis kelkajn minutojn de la unua elsendo kaj intervjuon kun la fondinto Svetislav Kanački pri la historio de 3zzz kaj la rolo de Esperanto en ĝi. La elsendo aŭskulteblas ĉiun lundon je Melbourne Ethnic Community Radio 92.3 3ZZZ ekde la 1a ptm ĝis la 2a ptm. Komputile oni povas trovi ĝin ĉe www.3zzz.com.au. ★

Kam, Miranda, Jenny, Richard kaj Alan



La Dua Vivo

de Matthew Maguire

Lastatempe mi malkovris tre interesan lokon en la interreto, . Ĝi estas virtuala mondo. " Ĝi nomiĝas "Dua Vivo", ĉe <http://secondlife.com>.

Kiam oni kreas konton en Dua Vivo, oni konstruas virtualan korpon, kiun oni nomas "avataro".

Ekzistas multegaj interesaj lokoj en Dua Vivo, sed mia plej ŝatata loko estas la loko "Esperanto-Lando". Oni povas atingi ĝin rekte per la ligilo <http://slurl.com/secondlife/Capitol%20City/127/215/23>. En tiu loko, oni renkontas aliajn esperantistojn. Oni ankaŭ trovas klasĉambrojn, kie okazas lecionoj por kaj komencantoj kaj progresantoj. Je ĉiu mardo, je la sesa horo (laŭ orienta aŭstralia horo), mi ĉeestas la kurson por progresantoj. Nia instruistino estas Anna Löwenstein, akademiano, kaj verkisto de esperanta romano "La Ŝtona Urbo". La kurso por komencantoj okazas ĵaŭde.

Okazas pluaj esperantaj okazaĵoj en Dua Vivo. Je oktobro 2007 okazis la unua DuaViva Universala Kongreso, kun konkursoj, prelegoj, kursoj, kaj eĉ ekskursoj (kompreneble en la Dua Viva mondo!). Espereble la venonta kongreso estos eĉ pli granda kaj sukcesa ol la unua. Se oni volas scii pli pri esperanto en Dua Vivo, bonvolu viziti la retejon: <http://www.freewebs.com/duavivo/index.htm>★.






Aŭstralia Somerkursaro de Esperanto



Lernu kaj ĝuu Esperanton en belega Sidnejo!

de la 11a ĝis la 25a de januaro 2009

- komforta loĝado en la urbocentro de Sidnejo
- kursoj por ĉiuj niveloj – kaj speciala kurso por infanoj
- vizitu la Havenponton, la Operodomon, kaj la plaĝon de Manlio
 - ekkonu la ekzotikajn faŭnon kaj florojn de Aŭstralio
- ludu, babilu kaj societumu kun esperantistoj el la tuta mondo
- eltrovu pri la aŭstraliaj kulturo kaj historio per vizitoj al muzeoj kaj artgalerioj
 - ekskursu al la klifoj kaj kavernoj de la magiaj Bluaj Montoj
- partoprenu la viglan noktan vivon de Sidnejo – per Esperanto



<http://aesk.esperanto.org.au>

Geedziĝo

de Kam Lee

Matene, 16-an de Februaro 2008, je Preĝejo de Sankta Jude en Melburno, okazis la geedziĝo de Richard Penman kaj Mina Chiba. Kelkaj Esperantistoj estis invititaj kaj ĉeestis. Multaj homoj ĉeestis por la ceremonio. Okazis la ludado de violono, gitaro kaj fluto. Kantistino gvidis la kantadon de la kantoj.

Post la geedziĝo, mi parolis al la patrino de Richard. Mi prezentis min al la gepatroj de Mina, kiuj elvenis el Japanio por la evento. Simila ceremonio okazos por Richard kaj Mina en Japanio iam dum ĉi tiu jaro.

Dum la vespero de la geedziĝo ili flugis al Tajlando por geedziĝferio dum unu semajno. Bonan memorindan aventuron al la paro, kaj estu la komenco de forta kaj sincera amrilato! ★



Mina, Richard kaj Esperantistoj. La grupo estis fotita de la patrino de Mina per mia fotilo en ĉambro en la preĝejo. Malantaŭ Maldekstre al dekstre: Jeff, John, Elrae, Alan, Kam, Andrew. Antaŭ maldekstre al dekstre: Anita, Mina, Richard kaj Jenny.

Malfermata vojo

'Openroad Conference' Melburno

de Jennifer Bishop kaj Kam Lee

Por du tagoj antaŭ Internacia Tago de Multlingvismo, la 17^a de majo, la membraro de MEKK (Melburna Esperanto KafoKlubo) entuziasme akceptis la eblecon starigi Esperanto-informbudojn nome de AEA. Ĝi estis unu inter tri budoj pri lingvoj per komputilo kaj du pri multlingvaj bibliotekservoj. Esperantaj flagoj, libroj, gazetoj kaj standardo estis montritaj. Televidilo estis instalita kaj montris Esperantajn lecionprogramojn. Multaj kopioj de la libro "Esperanto por Infanoj." estis donitaj al la partoprenantoj de la konferenco. Nova desegnita pamfleto estis ankaŭ donita kaj ĝi temas pri trajtoj de Esperanto kaj informo pri



Richard Penman, Kam Lee kaj Jenny Bishop

la venonta Esperanto Somerkursaro en Sidnejo.

El la tri esperantistaj deĵorantoj samtempaj (entute ni estis 8 personoj: Miranda Lutz, Carol Lutz, Andrew Lutz, Margaret Inglis, Alan Bishop, Kam Lee, Richard Penman kaj Jennifer Bishop) nur unu rajtis ĉeesti la programon de prelegoj. Tiel ni decidis ke Miranda kaj Jennifer respondecu pri la programo, partoprenante po unu tuta tago, Jennifer en jaŭdo kaj Miranda en vendredo. ★

Raporto de Barato el okuloj de bahaa esperantisto

La 5a Azia Kongreso de Esperanto en Bengaluro
11-15 Feb 2008

de Paul Desailly

Post proksimume du jardekoj da disvastigado de la Bahaa Kredo kadre de internaciaj Esperanto-kongresoj mi persone estas spertinta plenmanon da agnoskoj de Baha'ullah kiel Disendito por nia erao. Ke tiuj ĉi novaj agnoskantoj volas daŭrigi siajn serĉon kaj enketojn per la patrina lingvo inter siaj samlandanoj estas afero pri kiu mi simpatias. Fakte mi invitis ilin dum tiuj ontaj interrilatoj kun malnovaj bahaanoj disdoni sciigojn pri la Internacia Lingvo por ke reciproka interkomunikigo estiĝu. Gravas por bahaanoj ke ni diskonigu niajn apartajn principojn kiel dro Zamenhof mem rimarkigis okaze de la naŭa Universala Kongreso en Svislando. Tamen, ke relative malmultaj bahaanoj konstata la gravecon de la lingva principo aŭ la kialojn ligitajn al ĝi certe estas afero konsultota. Eble kaj espereble novaj samkredantoj kaj simpatiantoj el la vicoj de niaj Esperantistaj amikoj tiurilate sukcesos al junaj bahaanoj.

“ Gravas por bahaanoj ke ni diskonigu niajn apartajn principojn ”

Eminentuloj de la Esperanto-movado en Azio plenkore ĉeestis nian bahaan fak-kunsidon: Abdul Salam kiu estas la prezidanto de Federacio Esperanto de Barato ne nur partoprenis sed dum sia oficiala fermo de la Kongreso publike de la podio rekomendis la saĝecon de la Bahaa Kredo al ĉiuj Esperantistoj. La nove elektita prezidanto de Komisiono de UEA pri Azia Esperanto-Movado, profesoro Lee Jung-kee, kun kiu mi havis la plezuron dum la tuta kongreso dividi ĉambron. Ĉeestis po unu horo nian bahaan kunsidon; ni intershanĝis multe da bahaaj kaj wonbulismaj materialoj.

Fame konata Miko Sloper de Usono kune kun sia edzino ĉeestis la tutan 90 minutan paroladon. Li ĝoje akceptas inter aliaj aferoj rektan ligon inter filozofoj de antikva Grekio kaj Judaismo. Hansa klarigis al sia edzo la konsekvencojn de ĉi lastaj por modernaj historiistoj ★

Esperanto dreaming

Come along on this very good dreaming with us!

de Dianne Lukes

Sixteen people gathered at Esperanto House, Redfern, Sydney, under the auspices of GetUp Australia, to consolidate the steps having been taken towards rec-

Ten of them told their stories of why they had come, what they felt about their relationships with and understanding of the local aboriginal people and how the



conciliation which were begun on Sorry Day. Unfortunately, for us, there were no Indigenous people among us. Yet, as the host, I felt we had a group of genuinely caring and interesting people.

present situation could be improved. Five of the group did not have enough English to contribute, having come from South America only a month ago. They were four children and their friend, Luse, who

has been caring for them in Bolivia, while their mother, Edith, worked hard to bring them to Australia. Luckily for us, Edith, was able to tell us their story. Luse also has a husband and three smaller children still in Bolivia, whom she is arranging to bring back to Australia.

This was their dreaming: The two families were among a group of about thirty people who lost their homes and all their possessions during devastating floods in Bolivia early last year. Together they had enough money for Edith to come over to Australia first. Luse and her husband who is a doctor, cared for all seven children in refugee conditions until Edith could arrange all the paper work and pay for their passage. They are both now earnestly awaiting for the rest of Luse's family to be able to join them in this haven we all call home, Australia.

This was only one of the dreamings that we heard about.

Including myself there were eight Esperantists in our group. The Esperantists included the four children seen in the front of the photo. Also their mother, Edith, with her arms around her younger son, and her friend, Luse, who is standing on her left are both Esperantists. Volo and I are standing at each end of the front line. The photo is taken inside Esperanto House, so beautifully renovated by Igor, the immediate past President of AEA and Tim, his partner in all they have achieved.

After the photo the children said good night to everyone and went back with Luse to the guest room to do their homework for school. They are working hard at intensive lessons in English. Thanks to the Esperanto Federation of NSW they have been staying as guests at the Esperanto House since they arrived in Australia and until Edith can find suitable ac-

commodation for them, at a rent she can afford.

Before everyone left, some of the participants asked me about Esperanto.

What an opening for me! Of course I gave them the internet address: www.esperanto.org.au and told them how they themselves could learn it at: www.lernu.net. I explained how it could open up their lives to the rest of the world, as it has mine. After all, I was over 50 when I started learning it and I have had the most wonderful international experiences, thanks to knowing and being able to speak Esperanto. I assured them that it is really easy to learn and it is something everyone can do to help towards international understanding and world peace.

Thanks was given to all the participants and especially those who offered various types of help to Luse, Edith and their families. ★

Dianne Lukes estas la nova prezidanto de AEA.

Adiaŭ al Jean Lehane

Nekrologo

de Hazel Green

Rimarku la numeron de ĉi-tiu bulteno. La lasta numero de ToowoombaTereno estas la 180a, kaj la unuajn 154 faris Jean Lehane. "Faris" signifas verkis, tajpis, redaktis, kopiis, kaj dissendis loken kaj eksterlanden, tute sen plendo pri la laboro.

Ĉi-jare ni funebras la forpason de Jean, kiu mortis la 22an de aprilo. Jean faris multon por Esperanto en Toowoomba, en Australio, kaj tra la mondo. Unu el la fondintoj de Toowoomba Esperanto-Societo en 1970, Jean prezidentiĝis en 1975, kaj restis en tiu posteno gis 1997. Dum jardekoj, esperantistoj de Darling Downs kunvenis ĉe Jean, kaj tie ili ricevis varman bonvenon, ekzercon je Esperanto, amikecon, kaj la ŝancon vidi multajn elefantojn. Jean instruis Esperanton en la Plenaĝula Eduka Centro (nun TAFE) kaj poste en la Universitato de la Tria Ago. Kun Satto Williams, Jean instruis en du elementaj lernejoj en 1980. Ni povas danki al Jean pro niaj

aŭstraliaj somerkursaroj: ŝi instigis kaj organizis la unuan. Tiu estis en januaro 1977 en gimnazio Downlands College, kadre de somerkursaro de la tiama Darling Downs Institute of Advanced Education (nun USQ). Ŝajne, la fruaj somerkursaroj en Toowoomba ne estis tre luksaj aferoj, sed Jean instigis almenaŭ unu gravan kutimon: inviti vigan eksterlandan instruiston al la kursaro. En 1979, Jean aranĝis ke Audrey Childs-Mee instruu en la dua somerlernejo en Toowoomba. Jean havis multajn korespondajn amikojn tra la mondo, kaj ŝi ankaŭ bonvenigis eksterlandajn esperantistojn al Toowoomba. Ŝi tradukis la informbroŝuron pri Toowoomba Japana Ĝardeno en Esperanton. En 1997, oni invitis ŝin kiel honoratan gaston al la 45a kongreso de Esperanto en Kansajo por reprezenti Toowoomba, ĝemelurbo de Takatsuki, la kongres-urbo.

Naskita en kampara Novsudkimrujo, membro de la Australia Women's Auxiliary Service en Sidnejo dum milito, Jean venis al Toowoomba kiel juna vidvino kun tri gefiloj. Al Mary, John, kaj Pat ni kondolencas. ★



Jean Lehane, Honora Fratino de AEA, en la centro

Komuna lingvo

Sandor ne ĉesas informi

de Katja Steele

Post sia unujara restado en Koreio Sandor Horvath reiris al sia Adelajda laborloko UNISA (University of South Australia) por instrui la anglan precipe al eksterlandaj studentoj.

Tie la instruado de la "Akademia angla" havas 6 nivelojn el kiuj Sandor zorgas nun pri la 3-a. Liaj studentoj okupiĝos pri la angla duonan ĝis unu jaron kaj poste iros al universitato.

Unu el la aktualaj taskoj de la lernemuloj estas aŭskulti prelegojn kaj poste skribi pri ili eseojn. Plej kutime oni uzas nur kompaktdiskajn registraĵojn de prelegoj. Ĉar Sandor preferas "vivantan"

prelegon kaj kiel esperantisto temojn rilatantajn al la lingva demokratio kaj Esperanto, li invitis al siaj klasoj verajn parolantojn. Unue en la lasta semajno de marto paron Amato (Koreio) kaj Rikardo (Britio) kaj la 22-an de majo Trevor Steele (kun asisto de Katja Steele).

Jen kelkaj citaĵoj el la granda stoko de la postevente skribitaj eseoj (origine anglalingvaj) de la ĉeestintaj studentoj:

"Esperanto estas bazita sur eŭropaj lingvoj kaj tio ne estas justa al la azianoj."

"La angla havas fortan avantaĝon, ke ni povas pere de ĝi gajni monon."

"Esperanto povus esti bona dua lingvo por la mondo, sed ĝi ne estas sufiĉe neu-

trala por la tutmonda komunikado. Eble ni bezonas alian, pli bonan internacian lingvon."

"En la mondo Esperanto estas la plej justa lingvo."

"Estas tre bona ideo krei tutmondan lingvon por la internacia kompreniĝo kaj

Esperanto estas por tio la plej bona kandidato."

"Komuna lingvo helpas la homojn pli bone kompreni la mondon kiel tutaĵon.

Sed mi ne kredas, ke la celoj kaj ideoj de Esperanto povas realiĝi pro la sekvaj kialoj: Unue, lingvo estas parto de kulturo. Se la homoj tro uzos Esperanton, eble ili perdos la

propran lingvon kaj kulturon. Due, studante Esperanton ni malŝparas nian energion. Aktuale ni jam trovis unu komunan lingvon, kiu estas la angla! Ni uzas la anglan por komuniki kun homoj el diversaj landoj pri diversaj temoj. Laŭ mia opinio lingvo estas nur rimedo de komunikado, do lerni Esperanton por anstataŭigi la anglan ne estas necesa." ★

**"En la mondo
Esperanto estas la
plej justa lingvo."**

Historio nekompleta

de Vera Payne

En ESK Marto-Aprilo 2008, la artikoleto p-22 "Ni pri ni, oni pri ni" fare de Katja Steele, informas, ke Internacia Pedagogia Revuo 4/2007 aperigis mallongigitan historion de Esperanto-instruado en Perto. Post kiam mi legis la plenan artikolon, en ESK Novembro-December 2007, mi atendis, ke iu aglo-okula leganto kun bona memoro skribos al ESK, ke fakte tiu ne estis la kompleta historio de instruado en Perto dum la lastaj tridekelkaj jaroj. Mi atendadis vane. Do, pardonu se vi opinias la sekvon iom fanfaroneta, sed mi vere ne volas, ke en la instruad-kronikoj de Esperanto en Perto unu nomo tute malaperu – la mia. Ĉar mi elkore "investis" mian tempon kaj laboron al tiu idealo mia, dum pli ol 30 jaroj. La komenco: Tuj post mia reveno de du-jara loĝado en Sidnejo kun mia familio, mi apenaŭ malpakis la valizaron antaŭ ol min tordebrakis Idyss Einihovici, ke mi instruus Esperanton al geinfanoj en Floreat Elementa Lernejo kaj ankaŭ al instruisto en tiu lernejo, por ke li povu daŭrigi la instruadon. Mi kompleksis. (1972) PEAC – Primary Extension and Challenge: Fakte estis mi kiu unue enkondukis Esperanton al infanoj ("aparte interesataj kaj talentaj") el diversaj elementaj lernejoj, en la centro Embleton-Morley. Poste, mi faris la samon ĉe Deanmore Elementa

Lernejo, en la sekva jaro transdonante la postenon al Patricia O'Connor. (Tre mirigis min kiom rapide kelkaj geinfanoj lernis. Mi utiligis la filmon Mazi, kaj la lecionojn pretigitajn de Jenny Bishop por siaj kursoj en Melburno.)

All Saints College, Bull Creek: Enkondukon al diversaj lingvoj, inkluzive de Esperanto, mi instruis dum la jaro en kiu fondiĝis tiu kolegio – 1980, al geinfanoj en la unua alterneja klaso. Kvankam ili multe entuziasmiĝis, kaj komencis korespondi internacie, iliaj konservativaj gepatroj kaj lernejestro verŝajne trovis pli impresa mian enkon-

dukon al la franca kaj la japana, kaj dungis instruistojn en tiuj du lingvoj dum la sekvaj jaroj.

WACAE (Western Australian College of Advanced Education, nun Edith Cowan Universitato): Dum tri jaroj (1984-1986) mi instruis kurson al studentoj 17jaraj – 80+jaraj! La rezultoj de la ekzamenoj estis tiom bonaj (por pligrandigi la nombron en mia klaso sin registris kelkaj ELWA anoj, inter ili Shirley Gradusov kaj Dorothy Threlfall!), kompare kun tiuj de la aliaj lingvoj en tiu kolegio instruitaj, ke la instancoj dubis la valoron de tiom "facila" (= nevalora?) lingvo. Kaj tamen ni estis tie dum tri jaroj. Vizitante la universitaton en Mt Lawley nun, oni

" Mi atendadis vane."

povas vidi la Angofora arbon, plantitan por memori la Internacian Tagon kaj Jaron de Paco, kaj ankaŭ la instruadon de Esperanto, la Lingvo de Paco - 23/09/1986. (La honoraj gastoj ĉe la ceremonio inkluzivis la estron de la lingvo-departemento, la tiaman urbestron de Perto, kaj la postan UN ĉefon en OA. Ĉar la ŝildo iel perdiĝis, Owen Loneragan en Aprilo ĉi-jare aranĝis remetaĵon.)

Mi instruis Esperanton dum pluraj jaroj en vesperaj klasoj ĉe Perth Modern School (samtempe kaj plentempe dum la tago instruante diversajn temojn en aliaj altlernejoj), kaj ankaŭ ĉe Churchlands Senior High School dum unu jaro. (Multaj el miaj studentoj aliĝis al ELWA, kaj kelkaj restadis.)

Kiam Curtin Universitata Radio komenciĝis en Perto, dum almenaŭ unu jaro mi disaŭdigis Esperanto-kurseton, utiligante la etan studlibron de Mason Stoddart. Oni aŭskultis la programon, telefonis por aĉeti studlibron, faris la lecionojn kaj sendis ilin al mi por korekti. En la samaj programoj estis ĝenerala informo pri la lingvo kaj la movado - loka, nacia kaj mond vasta.

SFSU: Kvankam ne en Perto, mi instruis en 1987 ĉe San Francisko dum la 3 semajna SFSU Someresio - la unua virino kaj la unua Aŭstraliano iam ajn invitata al tiu posteno. La sperto estis ege ĝua por mi, ĝuste kiel la instruado en somerkursaroj plurfoje ĉirkaŭ Aŭstralio kaj unufoje en NovZelando.

Montessori: Post la firo de Trevor Steel el Okcidenta Australio, mi instruis lecionon ĉiusemajne al Sheryl Ridout, la tiama Esperanto-instruistino en Perth Montessori. (La etpagon mi donacis al ELWA.)

Malmodeste mi ankaŭ menciis la lecionojn al divers-aĝaj homoj kaj grupoj (tiu lastaj laŭ la akcela metodo) en mia domo, kaj ankaŭ la korespondkursojn de John Moore - kompreneble la interesatojn el Perto kaj la cetero de OA li sendis al mi.

Nun, la historio de Esperanto instruado en Perto ekde 1970, registrita en ESK, estas iomete pli kompleta. ★

“ Nun, la historio estas iomete pli kompleta.”

Kameleona koloro

En antaŭa vivo, mi certe estis eta kameleono.

de Simone Armand

Mi estas sesjaraĝa kaj mi ŝatas la grenatkoloron. Mia kamarado Marcelo havas en sia nova kasteleto grenatkoloran krajonon. Li bonvolas pruntdoni ĝin al mi, tamen pintajli ĝin estas malpermesite de li. Jes ja, sed mi ne havas grenatkoloran krajonon.

Mi estas dek jaraĝa kaj mi ŝatas la tri kolorojn de la flago : blua, blanka, ruĝa. Estas la flago de Francio, mia lando. Mia patrino, la instruistino, diras al ni, lernantoj : « Respektu la francan flagon. » Ĉiu lernanto, sukcese trapasinte la ateston pri lernado, revenas fierege kun eta blua, blanka, ruĝa flago. Iam ankaŭ mi havos saman flagon.

Mi estas dek du jaraĝa. Mi sukcese trapasis la ateston pri lernado. Mi ne havas flagon bluan, blankan, ruĝan. Ĝi estas malpermesita.

Mi estas dek ses jaraĝa. La deviga koloro de vestoj en la lernejo por junulinoj estas marista bluo. Dum ses jaroj kaj eĉ pli mi abomenas la maristan bluan. Mi ŝategas la vivan ruĝon. Mi havas neniun ruĝan veston.

Mi estas dudek du jaraĝa . Mi iom ŝatas la verdon, sed ne tro. Tamen estas la koloro de la esperantista stelo. Tial mi devigas min ŝati la verdon.

Mi estas dudek ses jaraĝa kaj mi havas bebon. Mi pasie amas la kolorojn de tiama bebestaro : la puran blankon, la dolĉan rozkoloron, la paŝtelan bluan.

Mi estas tridek jaraĝa. Ni ferias : mi ekvidas la delikatan bluan alkoĉitan al la

montaro de la « granda Ŝartreŭz » (Char treuse). Mi ŝatas tiun bluan, mi revas pri ĝi dum la tuta griza vintro.

Mi estas kvindek jaraĝa kaj mi ŝategas la oranĝkoloreton de la tropeoloj. Ankaŭ la afidoj ŝategas ĝin. Mi havas neniujn belajn tropeolojn en mia ĝardeno.

Mi estas sesdek jaraĝa. Mi estas emeritulino. De mia tolseĝo mi plonĝas en la puran ĉielbluan substrekantan de gajaj blankaj nuboj. Mi ŝatas tiun revan bluan.

Mi estas sepdek jaraĝa kaj eĉ pli. Mi tute ne ŝatas la violnuancan bluan sur mia haŭto, kiam la anguloj de la mebloj turmentis min, agresis min, kontuzis min.

Mi ne vere scias, kiu estas mia preferata koloro, sed ĉiam plezurigas min tiu de iriza ventumilo de la ĉielarko sur griz-blua, preskaŭ griz-nigra ĉielo

En antaŭa vivo, mi certe estis eta kameleono. ★

.....
Simone Armand estas franca korespondamikino de Kay Andersen.



New Zealand Esperanto Association

P.O. Box 8140
Symonds Street
Auckland 1035
New Zealand

www.esperanto.org.nz
nzea@esperanto.org.nz
0800 350 781

David Ryan | President
prezidanto@esperanto.org.nz

Chris Krägeloh | Vice-President
esk@esperanto.org.au

Erin McGifford | Estrarano
erin.mcgifford@press.co.nz

Donald Rogers | Treasurer
dero9753@ihug.co.nz

Bradley McDonald | Secretary
bradley.m@woosh.co.nz

Howard Gravatt | Assistant Secretary
hgravatt@ihug.co.nz

NZEA's vision is for everyone in New Zealand to recognise the value of Esperanto as an international language.

NZEA is one of the oldest Esperanto associations in the world, and is responsible for promoting Esperanto in New Zealand, providing learning material, answering queries from the public about Esperanto, and organising the annual NZEA conference.



Australian Esperanto Association

Esperanto House
143 Lawson Street
Redfern NSW 2016
Australia

www.esperanto.org.au
info@esperanto.org.au
(+61 2) 9319 4775

Dianne Lukes | President
prezidanto@esperanto.org.au

John Abood | Administrative Director
admin@esperanto.org.au

Stephen Pitney | Financial Director
financoj@esperanto.org.au

Miranda Lutz | Dir. of Member Services
servoj@esperanto.org.au

Jonathan Moylan | Dir. of Promotion
informado@esperanto.org.au

Jennifer Bishop | Director of Education
edukado@esperanto.org.au

Kay Andersen | Dir. of Implementation
utiligado@esperanto.org.au

AEA was established for the promotion, education and use of the international language, Esperanto, in Australia.

AEA aims to make Esperanto available to help with intercultural understanding and harmony, and works to foster cooperation among Esperanto organisations with similar aims.



FEED YOUR BRAIN ESPERANTO

Esperanto is a fascinating language. Some learn it for travelling, others for corresponding with penpals, or chatting to people from all over the world over the internet.

Others learn it just to exercise their brain.

BRAINFOOD

WWW.ESPERANTO.ORG.AU • WWW.ESPERANTO.ORG.NZ

Due to its easy grammar and clever word formation system, you can learn Esperanto faster than any other language.